

La Riverrego

Vintro de 1999-2000

Esperanto-Societo Kebekia

N^o57^a, Jaro 14^a

Aŭstralio **Reveno al la tero de revado**

Maryvonne Robineau

Des aborigènes australiens tentent de renouer avec leurs traditions et reviennent s'établir sur les terres ancestrales.

Kelkaj aborigenoj revenas al siaj praavaj teroj. Jen veto por tiuj forlasitoj de l' historio kaj de la aŭstralia blanka socio.

La vilaĝo Tennant Creek ŝajne dormas sub la varmo. Vagas sur la stratoj kelkaj nigrhaŭtaj viroj kaj virinoj, kun tre malgaja mieno, se ne mortebriaj. Naŭdek elcentoj de la aborigenoj el Tennant Creek senlaboras.

Ni rapide forlasas la asfaltan vojon. Post okdek kilometroj da ruĝa tero, ni alvenas al ses kabanaj el onda lado. Ili formas la aborigenan komunumon de Kalumpulpa, kien ni venas partopreni en projekto pri plantado de arboj. Antaŭ ses jaroj, la maljuna Harry enmigris kun sia klano al tiu-ĉi tero, kiu estis ilia antaŭ la alveno de la blankuloj. Ses familioj vivas ĉi-tie, kune kun kelktrideko da skabiaj hundoj.

Ĉi-matene, la virinoj iras serĉi tuberojn. Gladys klarigas ĉiujn vivrimedojn de la veprejo, al ni kiuj ne vidas ion manĝeblan ĉi-tie kaj rapide mortus pro malsato en tiu duondezerto. *Ni trovas tuberojn kaj, laŭ la sezonoj, sovaĝajn fruktojn, prunojn, figojn...*

Vidu, ĉi-arbe troviĝas mielo. Ni, virinoj, ĉasas la etajn bestojn, la lacertojn... El nia plukado ni kunportas plurajn manĝeblajn radikojn kaj dikajn vermojn, blankajn kaj grasajn. Laŭdire frandaĵo, proteine riĉa! Ĉi-tage la komunumo pompe festenas. La viroj alportis belan kanguruon kiu rapide eniĝas en la fomon fositan rekte en la tero kaj kovritan per braĝoj.

Por ĉasi kanguruon, emuojn kaj sovaĝajn meleagrojn, la viroj anstataŭigis la bumerangon de siaj praavoj per fusilo. Kaj por kompletigi la veprejan menuon, la virinoj temp'al'tempe iras al la superbazaro de Tennant Creek. Ĉu pro tio ili perdis sian kulturon? Ne, plu restas la sankta rilato kun la naturo kaj iliaj praavoj, la kundividemo interne de la klano.

La vivo de aborigenoj baziĝas sur la spirita ligilo kiun ili flegas kun la tero. Por ili, ĝi ne estas posedebla. Ili estas parto de ĝi. Ili respondecas pri ĝi, ĝi estas ilia animo kaj ilia vivo. En Kalumpulpa, la klano de la maljuna Harry do retrovis sian teron tie, kie radikas ĝia kulturo kaj ĝia digno, tie,

kie iliaj praavoj travivis la *tempon de revado*.

Sed necesas mono por pagi la fusilon, la veturilon, la instruadon de la infanoj... Demando al la maljuna Harry: *Kiel vi povas perlabori iom da mono en tiu veprejo, por ne tro dependi de la asigno por senlaboruloj?*

— *Aĥ ne zorgu virineto — li ĉiam nomis min tiel — mi scias elturniĝi. Ĉi tie oni povas havi etan bredo-bienon. Ni ĉiuj laboris kiel vakeroj, kaj estas multaj sovaĝaj bovoj, kiujn ni kunigas por okupiĝi pri ili.*

Ili ankaŭ ekkultivas malgrandajn legom-ĝardenojn kaj bredas kelkajn kokinojn. Ĉiuj sem-saketoj estas videble ŝutitaj samloke kaj kunpremitaj unuj kontraŭ la aliaj, la tomato-plantaĵoj nur malfacile kreskos. Oni ne transformiĝas de ĉasisto-plukisto al terkulturisto en unu tago. Neniu gvidas ilin. Sed ekzistas volo elturniĝi, provi sintezon inter du mondoj. Volo i.a. konkretigita per la decido de la maljunuloj forigi alkoholon el la komunumo. Ĉiujn aborigenajn familiojn trafas tiu plago.

sekvo...

C'est le 14 décembre dernier que Zdravka Metz **lançait son livre** *Bestoj en Nia Domo*, devant quelques dizaines de personnes, à la bibliothèque du Mile-End, à Montréal. Le lancement a donné lieu à un article dans le *Journal Rosemont / Petite Patrie*, et a également intéressé M^{me} France Moreau, du projet *Notre Millénaire*, géré au Québec par la Fédération des centres d'action du Québec (www.notre-millenaire.ca).

...Novjara mesaĝo...

strebu malpligrandigi la distancon inter la « skoloj » por- kaj per-esperantaj de nia tuta movado kaj komunumo, kaj pli alproksimiĝi al la peresperanta flanko.

Sendepende de la demando de neŭtraleco, decidi pri la plej bonaj, saĝaj kaj prudentaj reagoj al multaj dornaj demandoj ĉiam restos problemo. Mi kredas ke, post pli ol cent jaroj, ni jam estas sufiĉe maturaj fari taŭgajn decidojn.

Ni ĉiuj ankaŭ iĝu pli toleremaj al la multaj diferencaj opinioj kaj tendencoj en ĉiuj vicoj de nia komunumo, kaj ni atente aŭskultu niajn kritikistojn.

UEA ne estas, kaj ne volas esti, la fonto de ĉiuj saĝoj pri la plej bonaj manieroj progresigi Esperanton kaj, pere de Esperanto, helpi la bonstaton de la mondo. Inkluzivemo, akceptemo,

La **Balkana konflikto** respeguliĝis en Esperantujo per kelkaj rezolucioj ne aparte gravaj. Pli grava estas la Agado Espero, kiun iniciatis kaj tegmentis UEA, por helpi militviktimojn. Precipe efika estis projekto *Mil familiaj pakaĵoj* de Humanitara Organizo Espero en Bosnio. Kadre de tiu projekto Esperantistoj aĉetis ne mil, sed preskaŭ du mil (ekzakte 1 998) pakaĵojn (ĉiu pakaĵo kostis 50 germanajn markojn), refoje pruvinte, ke ankoraŭ vivas la ideoj de Zamenhof kaj Hodler.

Aleksandr Korŝenkov [*La Ondo de Esperanto*, 2000, n^o 1. *Interredaktore*]

toleremo al ĉiuj fluoj de opinioj estu nia devizo.

Geamikoj, mi ne intencas prediki al vi. Fiere, memfide kaj ĉiatendence, ni marŝu antaŭen. [*El Reta Bulteno de KEA*, n^o 6.1]

...Aŭstralio...

Side sur polvo, ni konversacias kun la virinoj. Ni montras niajn familiajn fotojn kaj ili lernigas al ni kelkajn vortojn el siaj lingvoj. Kvar ili parolas : la warlmanpa, la warlpiri, la warrungu kaj la anglan. Sufiĉe bone por homoj, kiujn multaj rigardas primitivoj ! La virinoj scivole demandas : *En kiu direkto estas Francio ?* Ne facilas, ja, konkretigi la vojon por iri de Kalumpulpa, meze de la aŭstralia veprejo, al Saint Pierre-Montlimart, mia naskiĝvilaĝo, ie kuŝanta en la franca kamparo !

La jaro 2000 kaj Esperanto

Magda-Lena

La ŝanĝo de jarmilo ne kaŭzos problemojn por Esperanto. Tion konstatas la speciala komisiono de Komputila Rondo, kiu dum dek ok monatoj priesploris la demandon. Zamenhof jam en 1887 antaŭvidis la eblajn problemojn kaj indikis la jaron kvarcifere. Esperanto krom tio jam spertis la transiron de la naŭdeka jarcento al la dudeka. La nuna transiro ne implicas aliajn problemojn.

Specialan atenton la komisiono dediĉis al la demando, ĉu Ido povus esti kaŭzita de la ŝanĝo de jarcento. Ĝi konkludas, ke ne eblas trovi iun ajn pruvon pri tio. Laŭ la komisiono Idon kaŭzis cimo — simile kiel ĉiujn postajn proponojn pri skribo- kaj lingvo-reformoj. La cimo ne estas en Esperanto mem, sed en la kapoj de la proponintoj. Post unu aŭ du oscedoj de la sencimaj uzantoj de Esperanto la ĝenoj kutime senspure malaperas, estas la fina konstato de la komisiono. [*El Inter Ni*, dec. 1999, el la satira gazeto *Male*, www.esperanto.nu/male]

La Riverego (Le fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 \$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotkopiita 90⁰⁰⁰. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo : kebk-d.

Échéance pour le prochain numéro / llimdato por la venonta numero : 2000.03.15.

Rédacteur / redaktis : Sylvain Auclair. Ont collaboré à ce numéro / kunlaboris al ĉi tiu numero : Bruce Arthur, Michel Clément kaj Zdravka Metz. Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K. : Normand Fleury (président / prezidanto), Sylvain Auclair (vice-président / vicprezidanto), Jessy LaPointe (secrétaire-trésorier / sekretario-kasisto), Zdravka Metz kaj Yvon Roux.

Esperanto-Societo Kebekia / Société québécoise d'espéranto

6358-A, rue de Bordeaux

Montréal Québec H2G 2R8

Répondeur et télécopieur / telefonrespondilo kaj telekopiilo : (514) 272-0151

LaRiverego@esperanto.nu

<http://www3.sympatico.ca/esperanto>

Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA

Kep Enderby

La simbole kaj emocio grava jaro 2000, ĉesoĵla al nova miljaro, donas al multaj homoj — signife pli ol aliaj cirkonstancoj — emon kontempli la pasintecon, same kiel la estontecon. Cedante al la sama emo je tiu ĉi historia fojo, mi kaptu la okazon paroli — mi esperas, ne tro filozofie — pri kelkaj aspektoj de nia movado, de nia komunumo kaj de UEA mem, laŭ miaj observoj kaj spertoj dum mia ĝisnuna tempo kiel prezidanto de UEA.

Je la fino de la 20^a jarcento, eĉ se la revoj de niaj pioniroj pri Rapida Fina Venko ankoraŭ ne realiĝas, oni rajtas honeste kaj memfide diri ke la fenomeno Esperanto sendube sukcesis vivteni sin kaj progresi dum tiu ĉi tumultega jarcento, kies konjunkturoj certe ne helpis prosperigi ideojn similajn al la nia.

Ni ofte aŭdas akuzajn demandojn : kial ni ne atingis pli ? kial la entuziasmo kaj optimismo de niaj pioniroj plejparte velkis ? Sed mi respondas per demando : ĉu ni vere rajtis atendi pli ol tio kion ni jam atingis ? Se ni rerigardas al nia historio, la honesta respondo devas esti : ne ; atendi

pli estis utopie kaj tro optimiste.

Tamen, mi forte kredas ke ni rajtas eniri la novan jarmilon optimisme kaj kuraĝe, eble ne kun la espero atingi la samajn celojn, almenaŭ ne sammaniere kiel volis la pioniroj, ĉar iliaj celoj probable ne plu aktualas en la nuna mondo, tiom malsama al la ilia. Frontas nin, nuntempajn esperantistojn, tute alia mondsituacio. Konforme al ĝi,

ankaŭ ni mem, niaj organizoj, niaj sintenoj kaj strukturoj devos ŝanĝiĝi. Fakte, en nia rapide ŝanĝiĝanta mondo ĉiuj organizoj kiuj volas ĝin iel servi, devas konstante sin reformi.

Ne konvenas en novjara mesaĝo profunde trakti pri tio kiaj politikaj, taktikaj aŭ strategiaj ŝanĝoj estas dezirindaj, ekzemple, por UEA. Laŭlonge de la jaro, mi klopodos stimuleme fari kelkajn publikajn sugestojn. Konsekvencajn kritikojn kaj ideojn de ĉiuj interesatoj mi bonvenigas.

Tamen, mallonge kaj esence : kiajn problemojn de tiu speco mi vidas ? Fundamente gravas la fakto, ke dum la lastaj jaroj la ĝenerala publiko, precipe gejunuloj, ne multe interesiĝas pri Esperanto, Tio rezultas de la ĉiuhora inundo de tiel nomataj novaĵoj kaj komercocelaj allongaj distraĵoj, kiujn la nuntempa publiko tutmonde konstante spertas, kun sinteno ofte priskribita kiel apatio. Esperanto de longe ne kvalifikiĝas kiel inda novaĵo, kaj certe ne kiel komerca logaĵo. Nia idealismo en la moderna mondo klare ne plu sufiĉas sola.

Ni ankaŭ devas

kalkuli kun tio ke la antaŭjuĝoj kaj skeptiko de multaj elituloj kontraŭ ni daŭre restos.

Malgraŭ ĉio tio, nia unika Esperanta kultura vivo daŭre pliriĉiĝas kaj kvalite plialtiĝas. Nur unu ekzemplo : konstante eldoniĝas literaturaj verkoj altkvalitaj, tradukitaj kaj originale verkitaj.

Por progresigi nian aferon, ĉiuj sin

demandas : kion ni faru ? Mia unua kaj plej ĝenerala sugesto estas ke ni strebu plifortigi nian internacian senton de kohereco, sed ne en spirito sekteca, maltolerema aŭ ofenda al aliaj, ĉu Esperantistoj aŭ ne.

Due, por socia asocio kiu volas agi efike, ege gravas, evidente, la propra strukturo. Strukturo UEA, same kiel ĉiuj

Unue, ni strebu plifortigi nian internacian senton de kohereco.

internaciaj organizoj, havas multajn problemojn jam pro la fakto ke ĝi laboras internacie. La komitatanoj kaj estraranoj de UEA, kvankam statute ili havas la superan gvidrolon en la aferoj de UEA, necese impresas pli malfortaj kaj iom pli amatoraj ol la profesiuloj en la Centra Oficejo, ĉar la unuaj laboras en sia libertempo, dise tra la mondo. Tia kontraŭdira situacio kreas seriozajn problemojn — kiel en ajna asocio celanta agi kaj efike kaj demokratie — pri la kombino de efika gvidado kun efektivaj, ĝustaj, demokratiaj principoj de respondeco. Bedaŭrinde, akcepteblajn solvojn ne facilas trovi.

Trie, ni devas akcepti ke, kvankam la interpopola lingva problemo mondscale ege gravas, ĝi plejparte ne interesas la ordinarajn homojn.

Do, ree : kion fari ?

Mi sugestas ke, daŭre disvastigante la uzon de Esperanto per niaj tradiciaj metodoj, ni pliaktivigu en aliaj statute permesitaj aferoj, ekzemple, batalante por homaj rajtoj ĝenerale.

Kvankam pri certaj temoj ligas nin statute deviga neŭtraleco, la statuto permesas al ni, fakte eĉ kuraĝigas nin, tion fari. En niaj tiukampaj klopodoj, ni

...sekvo en paĝo 2^a

La Riverego 3

Ideo ligita al juneco

Henri Masson

Suite d'une *courte* recension d'espérantistes célèbres, ayant appris l'espéranto dans leur jeunesse, voire leur enfance. L'espéranto, seul projet réussi de langue planifiée, est aussi le seul à avoir été créé par un jeune...

En Estonio, Paul Ariste (1905-1990) lernis Esperanton 14-jara de Hilda Dresen. Siajn unuajn sciencajn studojn li verkis en Esperanto kaj aktivis por ĝi ĝis la fino de sia vivo. Li fariĝis tre rapide unu el la plej brilaj fakuloj en eŭropa lingvoscienco. Li akiris dum sia vivo aktivan scion de 26 lingvoj kaj pasivan de trideko. Li fariĝis membro de la Scienca Akademio de Estonio kaj honora membro de la akademioj finna kaj hungara, kaj de multaj aliaj sciencaj societoj kaj institutoj.

La litova profesoro **Jonas Dagys** (1906-1993) estis eminenta botanikisto kaj Esperantisto dum 70 jaroj. Li estis aŭtoro de plantfiziologiaj libroj en diversaj lingvoj inter kiuj Esperanto, kiun li lernis kiel 17-jarulo.

Paul Neergaard naskiĝis en 1907 en Danio kaj esperantistiĝis en 1925, do 18-jara. Agronomo, fakulo pri plantpatologio, membro de multaj akademioj inter kiuj la Franca Akademio de Agrikulturo, kaj la Hinda Akademio de Sciencoj, al kiu apartenis ne multe da eksterlandaj sciencistoj inter kiuj la usona plantbredisto kaj Nobelprimiito Norman E. Borlaug, patro de la *Verda Revolucio*. Pro sia agado en evolulandoj, Neergaard estis distingita en 1979 en Novjorko de la prestiĝa societo *Explorers' Club* al kiuj apartenis i.a. Peary, Amundsen, Byrd, Nansen, Piccard, Lindbergh, Heyerdahl, Hillary kaj la unuaj astronautoj.

Douglas Bartlett Gregor naskiĝis en 1909 en Britio kaj lernis Esperanton ekde la 14^a jaraĝo. Li fariĝis magistro pri klasikaj lingvoj en la Universitato de Oksfordo kaj elstaris ĉefe pro erudicio, rego de dudeko da lingvoj kaj

verkado de aŭtoritataj studoj pri la lingvoj kaj dialektoj de Norda Italio.

Fuĝio Egami naskiĝis en 1910 kaj lernis Esperanton kiam li estis studento, en 1928, t.e. 18-jara. Kvankam li famiĝis tutmonde kiel biokemiisto, li ĉiam subtenis Esperanton kaj estis dum periodo prezidanto de Japana Esperanto-Instituto. Li estis elektita kiel membro de la Scienca Konsilantaro de Japanio en 1949 kaj fariĝis ĝia prezidanto por 1969-72. Li estis prezidanto de la Internacia Societo por la Studo de la Originoj de la Vivo.

Ye Laishi (1911-1994) fariĝis post 1949 vicdirektoro de la Lingva Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, vic-ministro de la Ŝtata Komisiono pri Reformado de la Ĉina Skribo kaj Konsilisto de la Ŝtata Komisiono de Lingvo. Lia por-Esperanta agado estis konsiderinda kaj li grave kontribuis savi Esperanton en la 70^{aj} jaroj, dum la t.n. kultura revolucio. Esperanton li lernis en 1927, do 16-jara, kiel studento de la angla literaturo en Tokio.

Lev Kopelev (1912-1997), rusa germanisto kaj verkisto, estis inter la plej konataj disidentoj de Sovetio. Li lernis Esperanton en aĝo de 14-15 jaroj en Ĥarkov. En aŭtobiografio, li skribis ke li korespondis kun alilandanoj i.a. pri la kontraŭnaciisma agado sine de SAT. Kvankam li poste ne plu okupiĝis pri Esperanto, li agnoskis ke nia lingvo verŝajne gardis lin kontraŭ ksenofobio kaj grandpotenca ŝovinismo.

D^{ro} Ivo Lapenna naskiĝis en 1909 en Split kaj forpasis la 15^{an} de decembro 1987, precize la tagon de la Zamenhofa datreveno en la jubilea jaro de Esperanto. Li lernis Esperanton aŭtodidakte kiel 18-jarulo kaj tuj fondis

studentan klubon en la Universitato de Zagrebo. Li forlasis Jugoslavion en 1949, vivis en Parizo ĝis li instaliĝis en Londono en 1951. Li fariĝis profesoro en la renoma *London School of Economics* kaj aŭtoro de verkoj en la angla, franca kaj Esperanto. Eminentaj fakuloj pri internacia juro kaj ĉefe pri soveta kaj orienteŭropa juro, li estis patrono de Albanio ĉe la Internacia Kortumo en Hago. Longdaŭra prezidanto de UEA, li grave kontribuis al la prestiĝo de Esperanto, i.a. pro la unua rekomendo de UNESKO favore al Esperanto, en 1954 en Montevideo.

Tibor Sekelj naskiĝis en 1912 en Karpatmontaro kaj fariĝis jugoslava civitano. Li studis en la Universitato de Zagrebo kie li eklernis Esperanton 17-jara, en 1929. Esploristo, antropologo, muzeologo, ĵurnalistino, li supreniris la plej altan montopinton de suda Ameriko, Akonkagvo, sur kiu li plantis la Esperanto-flagon. Li estis inter la unuaj kiuj vizitis Nepalon. Liaj libroj, verkitaj en hispana, kroata kaj Esperanto, estis tradukitaj en dekoj da lingvoj. Originale verkita en Esperanto *Kumeŝaŝa, filo de la ĝangalo* aperis en pli ol 20 lingvoj kaj estis premiita de la ministerio de edukado de Japanio. Sekelj estis akceptita sinen de la Brita Reĝa Societo de Geografio kaj ricevis de la argentina registaro la ordenon de la Kondoro. Li uzis sian influon i.a. ĉe UNESKO kiu pro liaj klopodoj voĉdonis rekomendon favore al Esperanto en 1985 en Sofio.

Carl Stöp-Bowitz (1913-1997) lernis Esperanton kiel 14-jara lernejo en 1928. Li fariĝis eminenta sciencisto en zoologio kiun li instruis en la Universitato de Oslo. Li ĉiam aldonis resumon en Esperanto al siaj

nacilingvaj sciencaj studoj aŭ inverse. Li skribis : *Tago sen Esperanto estas por mi perdita tago*, kaj per tio ni povas kompreni kial li aktivis ankaŭ por la internacia Lingvo ĝis la fino de sia vivo.

Nikolaj Rytjkov naskiĝis en Smolensk en 1913. Li lernis Esperanton en 1929 — do, 16-jara — kaj fariĝis aktoro. Malliberigita pro sia Esperantisteco, li post 18-jara restado en siberiaj koncentrejoj forlasis Sovetion. Li atingis Brition en 1965 kaj tie li komencis karieron ĉe la BBC. Bedaŭrinde lia bela kariero estis frue ĉesigita en 1973 pro kancero.

Pri **Arie Sternfeld**, rusa sciencisto, specialisto pri aeronautiko, patro de la Sputnikoj, ni scias malmulte krom tio kion li diris pri si mem okaze de intervjuo kiun disaŭdigis la Esperanto-Redakcio de Radio Varsovio, la 6^{an} de septembro 1964 : « Pri la Esperantista movado mi vigle interesiĝis jam en la lernejoj. En tiu ĉi periodo mi eĉ intencis partopreni la Mondan Esperantistan Kongreson en Helsinko, tamen malhelpis min kaŭzoj de mi ne dependaj. En pli postaj jaroj, kiam mi komencis studojn en Francujo, kaj samtempe panakire laboris en la entrepreno de *Renault*, en tiu ĉi diverslingva medio mi ankoraŭ pli konvinkiĝis pri la neceso enkonduki komunan lingvon, kiel aldonan rimedon de la interkompreniĝado inter la homoj. (...) Kaj kvankam hodiaŭ mi legas la fakan literaturon en 11 lingvoj, kaj miaj disertaĵoj estas tradukitaj en tridek unu lingvojn, mi plue akcentas kun plena konvinko, ke Esperanto estas speciale bezonata por la transdonado de sciencaj informoj kaj por kontaktoj inter la sciencistoj. »

Unu el la plej famaj fakuloj pri islamo kaj la araba mondo, antropologo, erudiciulo, **Maxime Rodinson** naskiĝis en 1915. Esperanton li lernis jam tre juna. En 1998, 83-jara, li diris okaze de intervjuo kun la semajngazeto *Le Nouvel Observateur* ke li povas ankoraŭ legi kaj skribi en ĝi helpe de vortareto. Li aldonis : *Tio estas vere facila. Zamenhof estis genio.*

Laŭ la brita ĵurnalo *People*, **Sir Harold Wilson** konatiĝis kun Esperanto jam en sia junaĝo, kiel skolto. Li naskiĝis en 1916 kaj mortis komence de la jaroj 1990. Li apartenis al la Laborpartio kaj estis ĉefministro de Britio du fojojn dum entute pli ol 7 jaroj, de 1964 ĝis 1970, kaj de 1974 ĝis 1976. Li ricevis la nobelan titolon de kavaliro kaj fariĝis Lordo Wilson de Rievaulx.

Nobelpremiito de ekonomiaj sciencoj en 1994, **Reinhard Selten** naskiĝis en 1930. Li eklernis

Aperas ke junaĝa
lernado de
Esperanto ĉiam
efikas pozitive en
la vivo de multaj
homoj kaj ke
neniam tio estas
tempoperdo.

Esperanton ĉirkaŭ 17-jara, sola, en 1946-47, kvankam li jam pli frue konatiĝis kun la Internacia Lingvo. Okaze de intervjuo kun la revuo *Esperanto* de UEA, li diris ke la kono de Esperanto *eble ne helpas al Nobel-Premio, sed ĝenerale evoluigas la intelektan vivon de persono. Junaĝe lernita Esperanto donas grandan avantaĝon por alproprigi aliajn lingvojn.*

Profesoro pri semida filologio ĉe la universitato de Torino, longtempa sekretario de la asocio Italio-Irako, membro de unu el la plej famaj kaj antikvaj italaj akademioj, **Fabrizio Pennacchietti** naskiĝis en 1938. Li lernis Esperanton 16-jara.

La franca kantisto **Guy Béart** lernis Esperanton en infanaĝo ĉar lia patro mem estis Esperantisto kaj instruis al li la lingvon. Tion li trovis amuza kaj tre facila, kaj li lernis ĝin tre rapide.

Kvankam li ĉion forgesis pro manko de praktikado, li pruvis ĉi jare, okaze de la Universala Kongreso de Montpellier, ke li restas kore ligita al nia lingvo.

Nuna Ĝenerala Sekretario de Eŭropa Konsilio, **Daniel Tarschys** naskiĝis en Stokholmo en 1943. Li mem diris al la revuo *Esperanto* de UEA « Esperanton mi lernis post la angla, je la aĝo de 12-13 jaroj, kaj dum kelka tempo mi vaste korespondis en Esperanto kun gejunuloj en pluraj landoj. En 1956 mi partoprenis Universalan Kongreson en Kopenhago, kaj mi facile komprenis la parolatan lingvon. Al la demando : Ĉu Esperanto donis al vi ion specialan ? li respondis : Jes, nepre. Ĝi estas tre facila lingvo. La fakto ke mi lernis ĝin dum kelka tempo donis al mi specon de lingva praktiko, adaptiĝa kapablo, de fido je gramatiko, kaj ĉio tio multe helpis min por studi aliajn lingvojn. » Eble necesas precizigi ke, krom la svedan, Daniel Tarschys parolas la anglan, la francan, la germanan kaj la rusan.

Certe pli profunda serĉado estas farenda ne nur pri la cititaj nomoj sed pri multege da aliaj, ekzemple pri **Efraim Kacir**, naskiĝinta en 1916, biofizikisto kaj ĥemiisto, iama ŝtatestro de Israelo kiu eklernis Esperanton ankaŭ junaĝe kaj kies patro estis agema Esperantisto. Mankas precizigoj pri **Franjo Tuđman**, nuna prezidento de Kroatio, kiu laŭdire lernis Esperanton en studenta aĝo en Zagrebo. Tion mi atingis per serĉado de ĉirkaŭ 20 horoj, sen kalkuli la verkadon, kaj konsultado de dokumentoj kiuj reprezentas tute etan parton el ĉio ĝis nun presita en Esperanto.

Virinoj

Virinoj estas bedaŭrinde tre malmultaj en tiu ĉi mallonga kaj senpretenda studo ĉar estis por ili multe pli malfacile eminentiĝi en la pasinteco ol nun. Ili ofte vivis kvazaŭ en la ombro de la edzo kaj ofte kontribuis diskrete, tre forte kaj decide en ties sukceso en

...sekvo en paĝo 8*

Tri respondoj el Okcidento

Bruce Arthur

Un membre saskatchewanais de la S.Q.E. donne son avis quant aux questions posées dans le dernier numéro de *La Riverego* sur le pourquoi d'une société québécoise d'espéranto. Il préférerait que les espérantistes canadiens unissent leurs efforts, mais déplore que le bulletin de l'association canadienne soit des plus irréguliers.

Min interesis la artikolo de Sylvain Auclair pri kial estas E.S.K. Mi jen donas miajn opiniojn.

Mi komencas per la tria demando: *Ĉu estu esperantista asocio en Kebekio?* Mi estas saskaĉevanano, ne kebekiano, do eble tio efikas mian opinionon. Sed mi scias, ke la Esperanto-movado en Kanado estas tre malgranda, kaj pro tio, estas malfacile trovi sufiĉajn laborulojn por funkciigi du apartajn organizojn. Eble se estus nur unu organizo, ĝi havus sufiĉe da aktivuloj por funkcii pli bone. (Tamen mi komprenas ke la distanco inter Kebekio kaj Brita Kolumbio kaj Nova Skotio estas problemo.) Krome, mi opinias, ke estus pli bone se anglalingvanoj kaj franclingvanoj estus en la sama organizo. Al pli multaj organizoj, la lingva baro estas grava problemo. Sed al ni, ĝi estas avantaĝo ĉar tiel ni povas montri, ke Esperanto bone funkcias inter parolantoj de malsamaj lingvoj. Kompreneble, ni devas uzi naciajn lingvojn por komuniki al la ekstera mondo, kaj por kursoj por komencantoj. Tamen, se estus nur unu Esperanto-organizo, ĝi enhavus aktivulojn de ambaŭ naciaj lingvoj, kaj ili povus facile fari tiun ĉi laboron.

Sylvain Auclair demandis: *Ĉu estu societo?* Mi respondas jese. Iuj devas organizi, do bezoniĝas societo. Al mi,

Volas korespondi kun kebekia Esperantisto S^{ino} Mayumi Kinoshita, 35-jara japanino, direktisto de patenta firmao, kiu interesiĝas pri foto, legado, muziko kaj kino. Ŝia adreso: #403, 5-4 Matsugaya 2-chome, Taito-ku, Tokyo 111-0036, Japanio.

le plej grava servo de organizo estas gazeto. Oni diras, ke multaj homoj uzas Interretan por trovi informojn. Tamen, ankaŭ multaj homoj ne uzas ĝin. Ekzemple, laŭ la Membrolisto de la Kanada Esperanto-Asocio, proksimume duono el la membroj ne havas retroŝtan adreson. Do papera gazeto ankoraŭ gravas pro sciigi novaĵojn. Mi aliĝas al ESK precipe por ricevi *La Riveregon*, kaj al KEA por ricevi *Lumon*. La ĝustatempa aperado de *La Riverego* plaĉas al mi. La neaperado de

Eble se estus nur unu organizo en Kanado, ĝi havus sufiĉe da aktivuloj por funkcii pli bone.

Lumo malplaĉas — mi pensas, ke mi ne re-aliĝos.

Trie, mi respondas al la unua demando, *Kial Esperanto?* Malfacilas allogi homojn al Esperanto, sed mi ankoraŭ kredas je ĝi. Esperanto havas avantaĝojn, kiujn ni diskonigu. Tamen, ni devas konfesi, ke ĝi apenaŭ utilas al homo en Kanado, kiu jam parolas gravan mondan lingvon. Sed multaj homoj volas lerni ion novan, eĉ lingvon novan. Eble ili volas ekzerci maljuniĝantan cerbon, aŭ eble ili nur amas lerni. Al tia homo, ni povas diri, ke Esperanto estas pli interesa ol alia lingvo ĉar ĝi estas pli facila, ĉar ĝi havas unikan historion, kaj ĉar ĝia studado plifaciligas la lernadon de alia lingvo. Krome, Esperanto, kvankam ne tre utila, estas nepre uzebla, ĉar estas parolantoj en pli ol cent landoj, facilas

trovi korespondantojn, estas abonebaj revuoj, k.s.

Ni ankoraŭ povas diri, ke se Esperanto havus pli da parolantoj, ĝi estus utila. Esperanto estas neŭtrala lingvo, do se ĝi estus uzata por internacia komunikado, estus pli juste ol la uzado de nacia lingvo. Kaj se lernejoj ĉirkaŭ la mondo instruus ĝin kiel duan lingvon anstataŭ nacian lingvon, la lernejoj lernus pli facile — kaj malpli multekoste. Mi opinias, ke estas inde, se ni konvinkas iun, ke Esperanto estas bona ideo, eĉ se tiu ne komencas studi. Sed la ideo pri kio povus esti Esperanto, povas instigi iujn lerni la lingvon. Ideo povas esti instigilo. Ekzemple, iuj studas la klingonan lingvon, ne ĉar ĝi utilas, sed ĉar ili amas la ideojn de *Star Trek*. Se amiko de Esperanto lernas Esperanton, tiu homo tiel montras al la mondo, ke Esperanto vere estas lernebla kaj uzebla.

Esperanto ankaŭ povus esti utila en la hodiaŭa mondo al internaciaj organizoj. La Esperanto-movado longe parolis pri la Unuiĝintaj Nacioj. Tamen, Esperanto povus esti utila ankaŭ al iuj internacia ne-registaraj organizoj. Efektive, tiuj organizoj eble estas pli facile konvinkeblaj, ĉar ili havas malpli da mono por tradukado ol havas la Unuiĝintaj Nacioj. Esperanto estus verŝajne utila al organizo, kiu laboras en diversaj landoj, kaj kies aktivuloj en la diversaj landoj devas interŝanĝi informojn inter si. Ni, kunlabore kun Esperanto-asocioj en aliaj landoj, povus disponigi kursojn al la aktivuloj de la organizo. Kaj se unu organizo sukcese komencus uzi Esperanton kiel sian internacian laborlingvon, ni povus uzi informojn pri ties sukceso por konvinki aliajn internaciajn ne-registarajn organizojn.

Europe et Amérique

Michel Clément

Après avoir lu l'article de Sylvain Auclair dans *La Riverego* de l'automne 1999, j'aimerais ajouter à ses lucides propos quelques détails et cela, de mes lointaines Cévennes...

Il est vrai qu'il est difficile de faire la promotion de l'espéranto en terre d'Amérique pour les raisons que nous connaissons tous, c'est-à-dire la prédominance, sinon la domination presque complète de l'anglais. Mais en Europe, le problème n'en est pas moins aigu et le libéralisme, à ce niveau, fait aussi ses ravages. Si les Québécois francophones sont souvent obligés d'apprendre l'anglais pour mieux vivre (et non plus pour survivre, heureusement, bien que...), ils ne sont pas fascinés par cette langue obligatoire et lourde de sens pour des minoritaires qui se battent depuis des générations pour garder et développer leur culture. (Paradoxalement, ils en subissent l'influence en ne réagissant presque plus... comme si articuler une pensée dissidente était dépassé !) En lisant les pages économiques et financières du journal *Le Monde*, on a déjà une très bonne idée de l'influence de la culture américaine malgré le fait qu'un très grand nombre de Français résistent avec beaucoup d'imagination. Pour la plus récente génération d'Allemands, par exemple, l'anglais est un fait acquis de civilisation qui n'a plus à être contesté... Alors, l'espéranto dans tout ceci ! Mes lectures tant historiques que théologiques me montrent à quel point la Internacia Lingvo était profondément répandue en Europe jusqu'à la Seconde Guerre mondiale ; j'ai souvent l'impression qu'après cette date, c'est devenu une guerre de tranchées qui n'est pas terminée... et que le flambeau est toujours porté par des individus (le travail incessant de

l'infatigable Henri Masson, par exemple) et par certains peuples minoritaires européens. Mais ne vivons pas de nostalgies ! Par contre, lorsque j'ai fondé le *Reto de esperantistaj historiistoj*, je me suis aperçu à quel point le mouvement espérantiste était européen et que si les moyens financiers manquent pour asseoir son influence hors d'Europe, il est alors hors de question d'insister... La prochaine étape, pour vous, espérantistes québécois, n'est-elle pas de créer une revue culturelle nord-américaine avec la contribution des Américains, Canadiens-Anglais et Mexicains, par exemple ?

Il est vrai que le nombre d'adhérents et de membres actifs au sein de la S.Q.E. est faible si on compare, mais il faut ajouter qu'il est difficile d'entrer en contact (sans ordinateur) avec un espérantiste français, surtout lorsqu'on habite en province... Il est aussi vrai que les activités de la S.Q.E. reposent essentiellement sur quelques membres passionnés... et que l'épuisement peut être un facteur important de désintérêt mais, si on fait à nouveau la comparaison, on pourrait être surpris par la qualité des cours de langue

donnés par notre Société et vous n'avez pas idée à quel point la bibliothèque que les Frères de la Charité ont contribué à augmenter... est une richesse dont il faudrait absolument prendre un soin jaloux. J'essaie, depuis deux mois, de trouver un endroit où je pourrais emprunter des livres en espéranto ; jusqu'à maintenant je n'ai reçu aucune réponse positive ni de Suisse ni même d'associations françaises...

Sylvain ajoute à son article : pourquoi québécois ? Pour moi, cela est évident. Puis-je invoquer le devoir de mémoire à cet égard ? Les Québécois, depuis la création et la diffusion de cette langue, jouent un rôle très important. Ils ont été relayés, après la Seconde Guerre, par un bon nombre de Canadiens-Anglais mais actuellement, il ne fait pas de doute que le mouvement est revenu à ses racines québécoises avec d'importantes contributions externes. Ces dernières ont donné une nouvelle impulsion à l'espéranto chez nous. De plus, les espérantistes québécois ont depuis longtemps établi des liens avec les États-Unis (voir Albert Saint-Martin et Beauchemin), ce qui, heureusement, se poursuit.

Zamenhofa festo

Zdravka Metz

En sabato 18^{an} de decembro okazis Zamenhofa festo en la Montreala Esperanto-Domo. Kiel tradicie, ni komune vespermanĝis en MED. Pli ol dudeko da plenkreskuloj kaj infanoj ĉeestis la manĝon kaj postan kantvesperon. La vespero estis internacia — de Usono venis Dominique, de Kroatio mia patro. Jeremy Bass pianludis kaj ni kantis diversajn kantojn : ĉi-foje la festo kaj la kultura vespero estis plene kantaj. Infanoj feliĉis ludante kun Damir, Mira kaj Jolaine. Ili eĉ ricevis donacetojn kaj tuj ekuzis la ludilojn.

Kejkaj libroj estis aĉetitaj — Zamenhofa tago estas ja *Tago de la libroj*.

Nia membro Parvaz agrable surprizis nin venante kun sia edzino. Bonvenon al ŝi. Ili montris al ni aron da fotoj pri la geedziĝa festo kiu okazis en Pakistano ĉi-somere laŭ la tradicio. Feliĉon la la novaj geedzoj.

La Riverego 7

Kalendaro de venontaj okazaĵoj

26^a de februaro ĝis 7^a de marto. Tria Internacia Himalaja Renkontiĝo, en Nepalo.

24^a ĝis 26^a de marto. **Kreola** kuriada semajnfino, en Plouézec (Francio).

7^a ĝis 9^a de **aprilo**. Kuirada semajnfino laŭ **vegetara** principo (Francio).

27^a kaj 28^a de **majo**. Plonĝo en la **ĉinan civilizon**, kun du membroj de la Ĉina Akademio de Sciencoj. La Chaux-de-Fonds (Svisio)

27^a de **junio** ĝis 2^a de **julio**. 10^a Internacia Esperanto-Kongreso, en Istanbul (Turkio)

26^a de junio ĝis 14^a de julio. Nord-Amerika Somera **Esperanto-Kursara** (NASK), ĉe San-Franciska ŝtata universitato (Usono).

5^a ĝis 9^a de julio. **Kultura Arta Festivalo** (KAFF), en Tuluzo (Francio).

17^a ĝis 23^a de julio. **Kultura Esperanto-Festivalo**, Finnlando.

25^a de julio ĝis 1^a de **aŭgusto**. 85^a **Universala Kongreso**, en Tel-Avivo (Israelo).

27^a de julio ĝis 2^a de aŭgusto. Internacia **Junulara Semajno** (Hungario).

5^a ĝis 12^a de aŭgusto. 56^a Internacia **Junulara Kongreso**, en Honkongo (Ĉinio).

7^a de **oktobro**. Interanacia **Ago-Tago**.

15^a ĝis 21^a de **aprilo 2001**. Kvina **Tutamerika Kongreso** de Esperanto (Meksikio).

21^a ĝis 28^a de **julio**. 86^a **Universala Kongreso**, en Zagrebo (Kroatio).

Julio 2002. 87^a **Universala Kongreso** de Esperanto, en Fortaleza (Brazilo).

Ni organizas

4^a de **februaro**. Kluba renkontiĝo, en la Montreala Esperanto-Domo. Temo : *kiun feston plej gravas al vi dum la jaro ?* 19 h 30.

20^a de februaro. **Glitkurado** en malnova haveno. Poste ni iros kune trinki varman ĉokoladon. 13 h.

17^a de **marto**. Kluba renkontiĝo, en la Montreala Esperanto-Domo. Prezento de l' filmo *Le dîner de con* (en la franca). Diskuto pri la filmo. Komuna vespermanĝo : kunportu ion *amuzan, strangan* aŭ *ekzotikan*. 18 h.

7^a de **aprilo**. Kluba renkontiĝo, ĉe Daniela, Ivano kaj Rumen (7122, rue Fabre, app. 1. Metroo Fabre, elirejo Fabre). Temo : *kial labori malpli ?* Komuna **vegetara** vespermanĝo. 18 h.

30^a de aprilo. Vizito al **acerejo** kaj farmbieno en Sankta-Bruno (ĉ. 15 \$). **Nepre antaŭrezervu** ĝis la 20^a de aprilo. 10 h.

12^a de **majo**. **Keglo-ludado**, ĉe 920, rue Saint-Zotique. **Nepre anoncu** vin semajnon antaŭe. 19 h 30.

16^a de **junio**. Kluba renkontiĝo, en la Montreala Esperanto-Domo. Diversaj ludoj. Komuna **latinamerika** manĝo. 18 h.

13^a de **aŭgusto**. **Pikniko** en parko La Fontaine. Rendezvuo ĉe la enirejo de Théâtre de Verdure. 17 h.

Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazaĵoj : (514) 272-0151 aŭ LaRiverego@esperanto.nu.

...Ideo ligita...

kiu ili sentis ankaŭ propran sukceson.

Marie Bonafous (1901-1980) naskiĝis en Aix-en-Provence. Ŝi Esperantistiĝis jam en junaĝo kaj uzis la Internacian Lingvon en multaj landoj, inter kiuj Ĉinio kie ŝi laboris du jarojn kiel tradukisto. Ŝi persone renkontis Maŭ Zedong kaj Ĝou Enlaj. Konata poetino en la provenca kaj franca, ŝi gajnis *kronpremion* de la Franca Akademio.

La 11^{an} de julio 1993, la Xiqu-a Poŝtmarka Kompanio de Pekino uzis oficialan dulingvan poŝtstampon en la ĉina kaj Esperanto memore al la unua datreveno de la morto de S^{ino} **Deng Yingchao**, la edzino de Ĝou Enlai, iama ĉefministro de Ĉina Popola Respubliko. Deng Yingchao naskiĝis en 1904 kaj lernis Esperanton en 1913, do 9-jara.

Tamen estas ĝojige konkludi tiun prelegon per rideto de

junulinoj. Temas pri la tri filinoj de la hungara Esperantista familio **Polgár**. **Zsuzsa**, **Zsófia** kaj **Judit** eminentas tutmonde en ŝakludo. Inter ili la plej juna estas la plej brila kaj esperdona. Nun 21-jara, Judit Polgár ne timus alfronti Kasparovon, sed Kasparov rifuzas alfronti virinon kiu, plie, estas juna !

Konsidere al la fakto ke la Esperantlingva komunumo estas proporcie tre malgranda kompare al la tutmonda loĝantaro, ke la lernado de la lingvo okazis plej ofte ekster la oficialaj instruprogramoj, aperas ke junaĝa lernado de Esperanto ĉiam efikas pozitive en la vivo de multaj homoj kaj ke neniam tio estas tempoperdo. Kaj certe grandan bedaŭron havas la ceteraj, kiuj ne havis eblecon lerni la Internacian Lingvon jam en unuagrada lernejo, jam en infanaĝo.